

LA PROGRESO

ĈEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ ĈESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ.

Aperas monate. Jara abono K 6.— (por 10 numeroj). — Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. —
Administrejo: Fr. Kavan, komercisto, Plzeň, Poděbradova tř. 6. — Konto de la Pošta ŝparkaso
no. 169.352. — Telefono: 732./VI. — La manuskriptojn oni ne resendas.

JOSEF GRŤA,

direktoro de burĝa lernejo en Trnávka apud Moravská Třebová, Ĉeĥoslovakio.

La 14an de junio antaŭ noktomezo mortis en Trnávka nia kara samideano Josef Grňa, inside mortigita per pafado de krimulo. Edzino kaj du infanetoj funebras en Je-
viĉko sian zorgeman nutrinton. Ni ne forgesos tiun ĉi ageman kunbatalinton, ho-
mon respektatan kaj amatan, konsciencan kaj fervoran instruiston. Li estis membro
de Internacia Asocio de Instruistoj kaj meritis pri nia lingvo eldoninte jam en 1908
la unuan libron de esperantaj tradukoj el ĉeĥa literaturo (Rakontoj de Arbes). Baldaŭ
li sekvis en Eternecon sian helpanton sinjoron Edmund Kolkop, profesoron en Je-
viĉko, esperantiston kaj projektinton de interslava lingvo arta, kiu en tragikaj ĉir-
konstancoj mortis dum la tutmonda milito vundite sur la rusa batalejo. Honoron
al Via memoro, karaj amikoj!
Rud. Fridrich.

B. TITTL:

POR SLOVAKIO.

Malgraŭ la klara decido de la Entento pri la limoj inter la Ĉeĥoslovaka kaj Ma-
giara respublikoj, ĉi tiuj ŝtatoj komencis
batali por Slovakio, la doloriga parto de la
meza Eŭropo, kies loĝantaro en sia pli
granda parto havas nenion komunan kun
la magiara lingvo kaj kulturo. La malno-
va perfortema reĝimo, kun kiu ne konsen-
tis kaj ne povis konsenti la magiara po-
pulo, scipovis senigi la Slovakojn en ilia
granda parto de la nacia fiero kaj mem-
fido, tiel, ke ili apenaŭ havis la fortojn
por atentigi la civilizitan mondon pri la
terura maljusto farita al ili tie sub Kar-
patoj, ĵus en la koro de Eŭropo. Kaj la
Bohemoj, batalantaj por sia ekzisto sub
premo de malamika despotismo, devis
kun malĝojo rigardi kiel iliaj slovakaj
fratoj mortas, kiel ili perdas konfidon al
si mem, kiel parto de ili kvazaŭ en ago-
nio apatie rigardas la mortigadon de ilia
nacia honoro kaj konscio.

B. TITTL:

O SLOVENSKO.

Přes jasné rozhodnutí dohody o hrani-
cích mezi Ĉeskoslovenskou Republikou a
Republikou Maĉarskou zahájena byla vál-
ka mezi oběma těmito státy o Slovensko,
tu bolavou část střední Evropy, jejíž oby-
vatelstvo ve velmi velké většině nemá s
maĉarským jazykem a kulturou naprosto
nic společného. Starý násilnický režim, s
nímž značná část maĉarského národa ne-
souhlasila a souhlasit nemohla, dovedl
Slováky ve velké jich části zbavit národní
hrdosti a sebevědomí, takže tito sotva měli
síly, aby upozornili civilisovaný svět na
hrozná bezpráví, které tam pod Karpaty,
přímou v srdci Evropy, na nich je páčáno.
A Ĉechové, zápasící o svoje bytí pod tlakem
nepřátelského despotismu, museli s žalem
přihlížeti k tomu, jak jejich slovenští bra-
tři zvolna umírají, jak ztrácejí důvěru sami
v sebe, jak část jich jakoby v agonii apati-
cky přihlíží k zabíjení jejich národní cti
a vědomí.

La subita solvo de la monda luktado alportis reviviĝon eĉ al tiu ĉi slava branĉo, kiam per decido de la monda tribunalo oni difinis, ke por la reciproka helpo kaj utilo ĝi kuniĝu kun la fratoj bohemiaj.

Tiel estis kreita la Ĉeĥoslovaka ŝtato. Kaj ĝiaj loĝantoj, apenaŭ liberigitaj, penante konstrui sian ŝtaton kiel eble sur plej moderna fundamento, komencis efektiviigi larĝajn reformojn, ie eble ne sufiĉe konsideritajn kaj antaŭtempajn, tamen intencitajn por utilo de la ŝtato kaj ĝia popolo. En malamo al la militado kaj militarismo ĝi konservis nur tiom da soldatoj, kiom estis necese por gardi ordon en la lando. La slovaka teritorio, post la foriro de magiara armeo estis okupita komence de memvoluloj, poste de legianoj kaj enlanda militistaro sub la ĉefa komando de la Entento.

La rapida antaŭiro de la rumanaj armeoj devigis la Magiarojn por ĝia haltigo amasigi kiel eble plej multe da soldataro kaj tial ili reprenis eĉ la militistaron troviĝantan sude de la ĉeĥoslovaka haltlinio. Kaj tion eluzis krimaj elementoj: post la foriro de la militistaro ili kuniĝis en bandojn, kiuj rabis kaj mortigadis kio estis ebla, Magiarojn eĉ Slovakojn, tiel, ke la konata neutralulo Piccione mem rekomendis okupi la teritorion forlasitan de Magiaroj, por tiel ĉesigi la terorismon. Tial la konata teritorio estis okupita de bohema soldataro. Bohemoj ne deziris militakiron. Tiu ĉi vidpunkto estas dokumentita per deklaro de bohemiaj socialistaj partioj, kiuj enhavas ĉirkaŭ duonon de la tuta nacio, ke en la okazo de konkuro ili proklamos ĝeneralan strikon.

La ordono de la Entento haltigis la antaŭiron de Rumanoj, kaj Magiaroj turnis sin tuj kontraŭ Ĉeĥoslovakoj. Ili estis bonege armitaj per propra materialo eĉ per tiu konfiskita al la armeo de Mackensen. Tiel ili akiris rapidajn sukcesojn kontraŭ la malforta kaj malbone armita bohema militistaro, kiuj estis haltigitaj nur tiam, kiam la francaj generaloj prenis la komandon super la bohema militistaro kaj la armeo estis kompletigita. Tiam venis nova ordono de la Entento, per kiu la Magiaroj estis devigitaj repreni siajn armeojn laŭ la fiksita haltlinio.

Jen estas la historio de la okazintaĵoj en Slovakio. Historio neordinare malgaja, ĉar ĝi kostis Bohemojn eĉ Magiarojn multe da

Náhlé rozuzlení světového zápolení přineslo vzkříšení i této slovanské větvi, kdy rozhodnutím světového soudu bylo stanoveno, aby k vzájemné podpoře a prospěchu spojila se s bratry českými.

Tak utvořen byl stát Československý. A jeho obyvatelé, sotva osvobození, ve snaze vybudovat svůj stát na podkladě co nejmodernějším, počali provádět dalekosáhlé reformy, někde snad ukvapené a předčasné, přes to však míněné ku prospěchu státu a jeho lidu. V nenávisti k válčení a militarismu ponecháno ve zbraní jen tolik mužů, kolik jich bylo zapotřebí k udržení pořádku v zemi. Slovenské území po vyklizení jeho vojskem maďarským obsazeno bylo s počátku dobrovolníky, později legionáři a vojskem domácím pod vrchním velením italského generála Piccione. Tak obsazena byla fronta stanovená čtyřdohodou.

Rychlý postup vojsk rumunských přinutil Maďary, aby k jeho zastavení shromáždili co nejvíce vojska, a tak odvolali i vojsko ležící jižně od československé demarkační čáry. A toho využily živly ničemné, shromažďovaly se po odchodu vojska v tlupy, které loupily a zabíjely co se dalo, Maďary i Slováky, takže sám známý neutrální generál Piccione doporučil, aby bylo obsazeno území Maďary opuštěné, aby učiněna byla přítrž této hrůzovládě. Tak bylo obsazeno českým vojskem známé území. Čechové nechtěli výboje. Toto stanovisko dokumentováno je prohlášením socialistických stran českých, tvořících as polovinu celého národa, že v případě výboje zahájena bude všeobecná stávká.

Rozkaz dohody zastavil postup Rumunů a Maďari obrátili se hned proti Čechoslovákům. Byli výborně vyzbrojeni materiálem vlastním i zabraným armádě Mackensenově. Tak dosáhli proti slabému a špatně vyzbrojenému vojsku českému rychlých úspěchů, jež zastaveny byly teprve, když velení nad vojsky českými převzali generálové francouzští a česká armáda byla náležitě sesílena. Pak přišel nový rozkaz dohody, kterým Maďari přinuceni byli stáhnouti svoje vojska na stanovenou demarkační čáru.

To jest historie událostí na Slovensku. Historie neobyčejně smutná, protože Čechy i Maďary stála mnoho krve — zcela zbytečně prolité. Vždyť rozkaz a přání mírové

sango — verŝita tute senutile. La ordono kaj deziro de la Paca konferenco ja estis tute klara, kaj sekve oni ne povis supozi, ke tiu aŭ aliflanka konkuro povus ĝin ŝanĝi.

Kaj el tiu vane verŝita sango unu venas instruo:

La malnovaj eĉ novaj ŝtatoj devas kontentiĝi kun la verdikto de la Paca konferenco, ili devas forlasi la pluan malamikcon kiu povas helpi al neniuj, kaj influi al la resaniĝo de enlandaj mizeraj ŝtatoj ekonomiaj, kaj al trankviligo de pensoj, tiel, ke ekregu la vera amo al patrujo, nome la amo al la krea laboro kaj estimo de kunulo al kunulo — kaj ne pasia lukto je potenco kaj perfortado de unu societa klaso la alian. La intereso de la patrujo kaj prospero de la tuta nacio postulas, ke en ŝtatoj regu politikistoj prudentaj kaj trankvilaj, konsiderantaj la utilon de la tuta nacio sed neniam personoj ekscesemaj kaj perfortemaj.

konferenco bylo zceta jasným, a nemohlo se tedy předpokládat, že by výboj na té či oné straně její rozhodnutí změnil.

A z té zbytečně prolité krve jedno jde poučení:

Státy nové i staré musí se spokojit s rozsudkem mírové konference, zanechat dalšího nepřátelství, jež nikomu prospěti nemůže a působit k ozdravení vnitrozemských rozervaných poměrů hospodářských a uklidnění mysli, tak aby zavládla skutečná láska k vlasti, totiž láska ku tvořivé práci a úcta druhu k druhu — a ne vášnivý zápolení o moc a utlačování jedné společenské třídy druhou. Zájem vlasti a její prospěch i celého národa žádá, aby ve státech vládli politikové rozumní a klidní, přihlížející k potřebám celého národa, nikdy však lidé výstřední a násilníci.

MAJSTRO JAN HUS.

(Iom da historio.)

Johano Hus, bohema eklezia reformisto naskiĝis en la jaro 1369 en Husinec, vilaĝo apud Prachatice en suda Bohemio. De la jaro 1398 li estis profesoro de la universitato en Praha, de 1402 predikisto en kapelo Betlémská en la sama urbo. Unu jaron poste li estis nomita rektoro de la universitato. Kiel predikisto li komencis batali kontraŭ tiutempe malmoraleco kaj tie li ektimis eĉ ne eklezion. Pasie li ekbatalis kontraŭ vendado de indulgenco kaj per tio li instigis kontraŭ si la katolikajn rondojn. Sed lia modesta kaj morala vivo eĉ liaj agoj alportis al li amon de vasta publiko. Kiam li komencis defendi la librojn de angla reformatoro John Wycliffe, li estis proklamita herezulo, ĉar li, laŭdire, defendis kaj vastigis doktrinojn falsajn kaj revoluciajn, ofendis honoron kaj potencon de papo kaj de sankta eklezio. Post kiam imperiestro Sigismund promesis al li sub skriba garantio liberan revenon, foriris Hus al la eklezia koncilio en Constance por tie defendi sian opinionon. Sed tuj post sia alveno li estis 28. novembron 1414 arestita kaj malliberigita. La koncilio postulis de li revokon de liaj »herezaĵoj« kaj kiam li respondis, ke li ne povas revoki antaŭ ol oni lin instruos pri liaj herezaĵoj, li estis kun terura malbenado degradita de sia pastreco, eksigita el la eklezio kaj la 6. ju-

lion 1415. bruligita sur la bordo de Rhejno apud Constance. Lia polvo estis ĵetita en la riveron.

Dro. Stan. Kamaryt:

NACIA TERITORIO.

(Respondo al s-o. L. A. Illing.)

La germana samideano leginte mian artikolon pri la internacieco de Danubo sentis sin kaj sian nacion tre profunde ofendita per la konstato, ke la rivero Danubo trafluas de Theben ĝis Vyšehrad la bohemian teritorion Li havis impreson, ke per tiu aserto oni volas ŝteli al lia nacio germana, al la nacio ju pli malvenkita des pli kore amata, parton de ĝia teritorio. Li suferas pro tio kaj lia doloro estas tiel arda, ke li eĉ ne hontas ofendi mian nacion bohemian (ĉeĥoslovakon). Mi ne povas koleri pro tio. Mi ja estas filo de la nacio, al kiu dum jarcentoj estis forrabitaj teritorio kaj infanoj, mi ja scias kiel doloras maljustaĵo eĉ sole dirita, kaj ĝi doloras precipe dum momento, kiam la nacio estas batata. Sed mi ne povas ne diri, ke s-o. Illing estas malbone informita ĉar mia aserto kaj konkludo estas pravaj. Li pripensu la sekvantajn liniojn, skribitajn laŭ verko de bohema geografo dro. V. Dvorský kaj li tiam jesos kaj estos dankema al mi, ĉar la vero estas tamen ĉiam pli bona ol malvero:

La maldekstra bordo de Danubo apartenas en la dirita streko de 145 km. al la nacia teritorio bohema, aŭ ĉeĥoslovaka (mia

nacio havas nun du nomojn, historian kaj modernan). Tial oni devas diri, ke Danubo estas ankaŭ ĉeĥoslovakia aŭ bohemia rivero. Ĉiu nacio de la eŭropa kulturo havas propran teritorion montrantan specialajn regionajn signojn. Sed la kaŭzo de tio ne estas, ke la nacioj estus al si trovintaj tian teritorion per iu neordinara pensemece: la fundamenta faktoro estis la teritorioj mem. Ĉiu teritorio de speciala geografia karaktero naskis unu nacion, aŭ almenaŭ unu nacian branĉon diferencon de la najbaroj. Diversforma eŭropa tero estus kaŭzinta naskon de diversaj nacioj eĉ tiam, se ĝi estus estinta okupita per unusola lingva gento. Estas tasko de la scienco korekti kaj difini faktorojn, kiuj kaŭzas specialan karakteron de la teritorio kaj laŭ kiuj iras la evoluo de la eŭropa homaro en la naciajn ŝtatojn. Ĝi tion faras laŭ la racionalismaj pensmanieroj, serĉante sole la veron, nature la homan veron — sed kio estas pli taŭga por kontentigi la homajn filojn ol la vero homa?

Tial ni trovas en Eŭropo jenajn tipojn de nacioj: 1. insulaj (Angloj), 2. insulaj kaj duoninsulaj (Danoj, Grekoj), 3. duoninsulaj kun malgravaj insuloj (Italoj, Hispanoj, Svedoj, Noroj, Finnoj kaj Estoj), 4. transkontinentaj, transigantaj teritorion de maro ĝis maro (Francoj kaj Rusoj), 5. apud enfluo de riveroj en maron (Hollandoj, Portugaloj, Albanoj), 6. apudriveraj kun enfluo en maron (Malsupraj Germanoj, Poloj, Litovoj, Letoj), 7. apudriveraj sen enfluo en maron (Magiaroj), 8. apud linioj de disiĝo de akvoŝtatoj (Mezaj germanoj, Supraj Germanoj, Ĉeĥoslovakoj, Serbokroatoj kun Slovincoj, Bulgaroj, Rumanoj).

Ĉiu eŭropa nacio senescepte havas krom la signo de la lingvo ankaŭ de elementa landa karaktero de sia teritorio. Sole la Germanoj preninte la teritorion de apudelbaj Slavoj, kunigas du signojn elementajn. Koncerne la bohemian nacion montris stabileco de ambaŭ ŝtatformaj faktoroj: teritorio kaj nacio tiel grandan forton, ke ĝi travivis ĉiujn trublojn de malproksima kaj proksima estinteco.

La teritorio degretita al la Ĉeĥoslovaka respubliko de la Paca konferenco, estas natura teritorio de nia nacio, sur kiu laŭrajte apartenas al ĝi libera regado. Tiu ĉi teritorio diferencas de la najbaraj geologie, apartenante al unusola tipo geomorfologia: ĝi estas fonta kaj disflua regiono de la plej gravaj centroeŭropaj riveroj: Elbo, Odro, Vistulo (Vista-Weichsel) fontas sur ĝi, Danubo kaj Tiszao (Theiss) prenas el ĝi siajn alfluojn. Ĝi kuŝas kiel potenca kunigilo inter germaniaj kaj poliaj apudri-

veraj ebenaĵoj norde kaj magiaraj sude, formante ponton interKarpatoj kaj Juraj Montoj, kompare kun tiuj ĉi regionoj ĝi estas teritorio alta, kaj ĝi malmulte similas teritoriojn najbarajn.

La malsimileco de la tuta teritorio al la najbaraj estas pruvita ankaŭ per speciala karaktero de kreskaĵaro, per la poveblo esti ekonomie sendependa, kaj per la kultura diferenco.

Etnografia signo de la tuta geografia unuo, kiun formas dek fontaj kavaĵoj de la plej grava eŭropa linio de flujdisiĝo estas bohemece (ĉeĥoslovakece). La bohema nacio plenigas ĉiujn tri bazajn kavaĵojn: Elbo-Moldavan, Moravo-Thaian kaj Danubo-subkarpatan per pli ol tri kvarono plimulto de siaj membroj kaj ankoraŭ pli granda procenta parto de loĝata surfaco. Ĉiujn tri ĝi kontinue okupas tiel, ke ilian centron ĝi ĉiam posedas komplete. En ĉiuj apudlimaj kavaĵoj: de supera Egero, Luzaĉia Niso (Neisz), Glatza Niso, Odro-Vistulo, Pogrado kaj Hermado-Slané ĝi sidas en minoritoj ie malgrandaj, ie tre gravaj. Krom la Ĉeĥoslovaka nacio ni trovas sole fragmenton kaj insulojn de kvar diversaj nacioj, de kiuj havas ĉiu sian propran teritorion alie. Tiuj kvar nacioj (germana, magiara, pola kaj rusa) formas ok apudlimajn fragmentojn sen kontinuo en interno de la teritorio, kaj ok iom gravajn lingvajn insulojn Ĉiuj fremdlingvaj fragmentoj kaj insuloj enhavas loĝantaron eĉ de ĉeĥa aŭ slovaka lingvo kaj multajn nomojn topografiajn kaj personajn de la ĉeĥa origino.

Tiel instruas la scienco kaj dokumentas per multaj aliaj argumentoj, ke estas natura rajto de la ĉeĥoslovaka nacio posedi kaj regi la teritorion donitan al ĝi de la Paca konferenco. Estas specialeco de la bohema nacio, ke ĝi plej malmulte de ĉiuj doktrinoj ŝatis ideon pri la »batalo por vivi«, kiu tiel ofte estis bazo de konkira ideo kaj ke ĝi plej sincere mokadis la germanan ideon pri la nacia nuntempa posedaĵo »nationaler Besitzstand«. La eŭropa publika opinio, kiu estimas la Wilsonan proklamadon de la nacia memdestino, povas esti kvieta koncerne le ĉeĥoslovakian ŝtaton. Ĉiuj kvar naciaj minoritoj en ĝi povas vivi uzante ĉiujn rajtojn de kultura nacio estante neniel malhelpataj en sia kultura evoluo. Tion ni povas firme proklami je la nomo de ĉeĥoslovaka nacio, kvankam mi ne regas ĝian politikon. Sed mi scias, ke nia tendenco estis neniam, kaj neniam estos, realigi la idealon de la Potenco, sed idealon de la Justeco

ĈEĤOSLOVAKIO.

La jubileo de Amerika sendependeco estis festita en tuta Ĉeĥoslovakio. El ĉiuj ŝtataj kaj publikaj domoj flirtis standardoj kaj ĉiuj gazetoj menciis la memorindan tagon. En Praha okazis festo de Amerika kolonio, kium partoprenis prezidanto Masaryk, ministroj Habrman kaj Klofáč, franca generalo Pellé kiel ĉefgeneralo de Ĉeĥoslovaka armeo, ĉiuj reprezentantoj de amikaj ŝtatoj, deputitoj, reprezentantoj de ĉeĥoslovakaj altaj lernejoj, de sciencaj kaj artistaj rondoj k. t. p. Membro de amerika misio s-o. John S. Porter tralegis tie la historian proklamon pri sendependeco de U. S. A. Poste paroladis s-o. Grane, ambasadoro de Amerika Unio.

La memortago de nacia martiro Majstro Jan Hus, kiu estis bruligita en Constance la 6. julion 1415., estis en libera Bohemio festita, kiel plej granda nacia festo. En la antaŭvespero de la memortago okazis en ĉiuj urboj, urbetoj eĉ vilaĝoj parolodaj pri tragedio de Hus, kaj pri Hus, kiel simbolo de veramo, laboremo kaj honesteco. Sur multegaj montoj kaj montetoj de tuta Bohemio vespere ekbrulis ŝtiparoj memortantaj la heroan morton de Hus en flamoj de Constance.

La Komunumaj Balotoj alportis ĉiuf flankan surprizon. Per ili oni konstatis, ke du trionoj de la nacio konsentas kun la socialistaj tendencoj. Jen luktis kvar ĉefaj partioj: socialdemokrata, bohema socialista, (ambaŭ estas al si tre proksimaj en la lasta tempo), nacia demokrata, (en ĝi estas kunigita plej granda parto de ĉefa inteligentularo), kaj la Respublika partio de bohema kamparo (en kiu kuniĝis kampistoj). La unuaj du partioj prenas nun la gvidadon de komunumoj en siajn manojn kaj laŭ tiu ĉi ilia sukceso oni transformos eĉ la ministraron, ĝis nun koalician, t. e. kreitan laŭ libera interkonsento de la partioj. La venkintoj devas nun pruvi, ke ili estas kapablaj plenumi tion, kion ili proklamis: doni plibonan faron al la popolo kaj samtempe utili al la produktiva kapablo de la ŝtato.

El Slovakio. Sistemo de Konsilantara respubliko estis proklamita en parto de Slovakio, konkerita de Magiaraj trupoj. Por ĝia prezidanto samtempe sin proklamis Ant. Janoušek, iama redaktoro de soc. dem. gazeto »Nova Doba« en Plzeň. El tiu ĉi gazeto ni sciigas, ke dum la milito estis Janoušek okupata en Klado, kie li defraudis monon al malriĉa laboristaro kaj forkuris en Hungarion. Ankaŭ aliajn pekojn kontraŭ la laboristaro li havas je sia konscienco. Lia edzino estas Magiarino.

Malgaja jubileo. La 21. junion forpasis unu jaro de la tempo, kiam estis en Plzeň mortpafitaj kvin infanoj. Tiam regis en ĉefaj landoj terura malsato. Vane oni atendis antaŭ la vendejoj du, tri, ĝis kvar tagojn, kiam oni vendados panetojn bakitajn el faba kaj diversgenera faruno. La popolo en longaj vicoj eĉ dormis sur la stratoj por ne perdi sian lokon. Jen kaj tie falis iu pala virino aŭ infano, pro malsato tute senfortigitaj. Kaj tiam, 21. junion 1918 la malsataj infanoj komencis ataki bakistano butikon en strato Koterovská. Alvenis taĉmento da magiaraj soldatoj gvidata de hebrea

leutenanto Würfel el Plzeň, kiu starigis siajn soldatojn sur la kruciĝo de stratoj Koterovská kaj Rubešova, kaj sen ĉiu ajn antaŭa averto ordonis pafi la infanojn. Multaj estis vunditaj, kvin el ili mortaj. Würfel poste foriris el Plzeň kaj verŝajne li ne plu revenos. Sur la loko de la mortigo estis en la jubilea tago malkovrita memorŝtono.

La komunumaj balotoj en Ĉeĥoslovakio pruvigis la falsecon de aŭstria populismigo. Ili atestas, ke la etnografiaj kartoj de Ĉeĥoslovakio estas tute senvaloraj, ĉar la proporcioj estas tute aliaj. La konataj insuloj de Budějovice-Budweis, Brno-Brün k. a. preskaŭ tute malmalperis kaj simile estas ankaŭ en »Deutschböhmen«, kie estas konstatita tre forta parto bohema.

Ftizo. Laŭ la lasta klasifiko estas konstatite, ke en Bohemio estas 40% da ftizaj infanoj. — Danke al milito!

Nova papermono aperos en monato julio. La centrona ŝtatbileto portas surskribon presitan brunruĝe sur helblua fundo: »Tiu ĉi ŝtatbileto, eldonita laŭ la leĝo el 10. aprilo 1919 no. 187, valoras 100 kronojn ĉeĥoslovakajn. Dr. Al. Rašín financa ministro. En Praha 15. aprilo 1919. La falsado de ĉi tiuj ŝtatbiletoj estas laŭleĝe punata.« La maldekstra flanko estas farita laŭ la propono de pentristo Mucha. La emblemoj de la kvar ĉeĥoslovakaj landoj estas kunplektitaj kun ornamo ĉirkaŭ du knabinaj kapoj en naciaj kostumoj. Malsupre estas montrita la valoro en ses enlandaj lingvoj. Malsamaĵ estas la banknotoj 20, 10, 5 kaj unukronaj. La aspekto de ĉiuj estas tre bela.

Kongreso de katolika pastraro ĉeĥoslovaka okazis la 29. jun. en Praha. Ĝi protestis kontraŭ la reformoj deciditaj de la Nacia parlamento: senekleziigo de la lernejoj, eksproprio de ekleziaj bienoj kaj predikeja leĝo (ĝi malpermesas uzi predikejon por politikaj paroloj), kaj kontraŭ la reformo de edzeca leĝo. Oni ankaŭ traktis pri fondado de la novaj organizaĵoj katolike-politikaj.

La subskribo de packondiĉoj de la germanaj reprezentantoj elvokis grandan ĝojon. Ĉiuj ĵurnaloj enpresis gratulajn artikolojn al renaskiĝintaj Francio kaj Belgio.

Asentoj de ĉeĥoslovaka sokolaro (gimnastika asocio »Sokol«) akzis en fino de junio. La regrutitaj membroj baldau prezentigos por kvarsemajna militista ekzerco. En okazo de milito ili faros specialajn regimentojn, kiuj per sia memvola severa disciplino estos certe gravaj faktoroj en la nacia defendo.

	DIVERSAĴOJ.	
---	--------------------	---

La venonta numero de La Progreso aperos fine de septembro. Dum la libertempo ni penos pretigi la vortarojn kaj lernolibron, por tiel helpi efikan propagandon de Esperanto en la vintraj monatoj. La mendojn akceptas jam nun nia administracio.

Informace cizny Esperantem (Informo de fremdlando pere de Esperanto) propaganda bohemeleksta flugfolio, kies tekston devas legi ĉiu bohema esperantisto, jam aperis. Ĝi estas

vendata de nia administracio por 40 heleroj afrankite (ankaŭ en poŝtmarkoj), ĉe la mendoj de pli ol 10 ekzempleroj ĝi kostas 25 hel., 100 pecoj 20.— K.

X. Brita Esperantista Kongreso okazinta la 6.—10. junio bonege sukcesis. Ĝin partoprenis 394 personoj, inter ili s-inoj Cense el la Centra Oficejo, s-ino Tiard kaj f-ino Gerard el Parizo, kelkaj Belgoj, Hispanoj kaj unu Armeno. 120 Angliaj urboj estis tie reprezentitaj La kongreso estis malfermita per publika parolado de s-o. J. G. Legge, Direktoro de Edukado en Liverpool. La riĉege vizitita kunveno unuanime akceptis rezolucion, kiu »urĝas la registaron starigi Komitaton por esplori la demandon de la lingvo internacia, kiel sugestita per la raporto de »Modern Language Committee« (Modern-lingva Komitato). Tiu ĉi estis antaŭ du jaroj fondita de la Registaro por esplori la demandon de studado de modernaj lingvoj en la Anglaj lernejoj. En sia raporto ĝi dediĉis al Esperanto unu ĉapitron, favoran al la lingvo). Dimanĉe okazis diservo, dum kiu predikis s-o. W. Page, red. de »The Esperanto Monthly«. Lunde matene okazis jara konferenco de la Brita Esperanta Asocio sub prezido de s-o. Warden, kie oni akceptis unuanime la deklaron kiu »Malaprobis kaj forte kondamnas la agadon de Dro. René de Saussure, lingva komitatano kaj akademiano, kiu ne konsiliĝinte kun siaj kolegoj, eldonis novajn projektojn por reformo de Esp.« Por amuzo estis aranĝita bela koncerto kie kunlaboris s-ino Applebaum kun sia 9 jara filineto, f-ino Maude kaj aliaj, poste ekskurso, kostuma balo, kiun partoprenis eĉ la fama Dr. John Pollen, k. a. La kongreso ricevis multaj salut-telegramojn, inter ili ankaŭ de nia redakcio.

Comité para la Propagación del Esperanto en el Comercio (Komitato por propagando de Esp. en la komerco) estis fondita laŭ la konata angla modelo (de so Marshall) ankaŭ en Buenos Aires (Argentino). De ĝi ni ricevis broŝuron kun la simila teksto kiel la konata angla kaj informilon pri la celo de la Komitato, al kiu estas aldonita aliĝilo por la argentinaj komercistoj. Ĉio estas skribita en la lingvo hispana.

Goĵigan viziton ni havis la 17. jun., kiam post la antaŭa telegrafa anonco vizitis nin s-o. inĝ. F. Cotrill el Washington, dumviva membro de U. E. A. Li venis estante akompanata de s-oj. kapitano Waterson, majoro Gabriel kaj Durych, sekretario de nia komerca ministro Staněk, por viziti la Ŝkoda-fabrikon kaj okcidentbohemiajn karbminejojn. La duan tagon li vizitis kune kun s-o. majoro Gabriel la historian urbdomon de Plzeň. Ilin akompanis nia red. s-o. Tittl. En la urbdomo la amerikaj gastoj estis bonvenitaj de la urbestro Dr. Mandl, kiu espriminte sian ĝojon pro ilia vizito, menciis la gravecon de Plzeň pro ĝia industrio kaj petis s-n. Tittl traduki liajn vortojn al la karaĵ gastoj. Poste li forkondukis ilin en sian kancelarijon, kie li donacis al ili kelkajn memoraĵojn de la urbo, kaj en la Halon, kie ĵus estis kunveninta la urba konsilantaro, inter kiu estis ankaŭ la prezidanto de la loka esp. klubo s-o. inĝ. Novák. La gastoj estis akompanataj ankaŭ tra aliaj ĉambroj de la urb-

domo kaj ĉie donis la urbestro klarigojn, kiuj tradukis so. Novák esperanten, so. Tittl ankaŭ anglan. So Cotrill estas tre fervora esperantisto, kiu ĉie forte propagandas Esperanton.

Reprezoj el La Progreso ofte aperas en nacilingvaj gazetoj. »Weekly Courier« en Liverpool represis nian artikolon el la 3. n-o. de prof. Kamaryt: »Internacia Danubo«, la jargona gazeto »Dos naje Lebni« represis nian noton »Kontraŭ akaparo« aldoninte, ke »nun ni eksciis la veran karakteron de Prahaj okazintaĵoj«. — »Lodzer Zeitung« alportis recenzon pri nia gazeto (ambaŭ de s-o. Šapiro).— S-o. Kriestanov sciigis nin, ke li uzas La Progreson por bulgara gazetaro, kiu havas nesufiĉajn informojn pri nia lando. Eĉ de aliaj flankoj ni estis informitaj pri enpresado de diversaj notoj el la rubriko »Ĉeĥoslovakio«.

Kora nobelo. »Al la noto, kiun ni enpresis sub tiu ĉi titolo en la lasta numero ni sciigas ke pastro Zelezný, prezidanto de »Kora nobelo« mendis antaŭ kelkaj semajnoj en la presejo de »Dělnické Družstvo« en Plzeň flugilojn pri sia asocio en »Esperantido« de René de Saussure. Erare la presejo sendis al ni la presprovaĵon por korekto kaj tiel ni sciigis pri la sekreta subfosa agado de tiu sinjoro. Nia malkaŝo multe lin koleras. Li sendis al nia redakcia kunlaboranto s-o. Kubásek longan leteron el kiu ni citas jenan »spritajon«: »... mi esperis, ke ĝi (La Progreso) estos kaprino de senkorna raso el Sanna, sed nun kreskas al ĝi kornoj, kiel al ordinara kaprino. Nu ne miru, la kornoj estas en la nuna respubliko en modo.« El tio ni vidas, ke s-o. Zelezný estas eksterordinare sprita. Estus domaĝe, se lia anima potenco restus nekonata al la vasta publiko kaj tial ni rekomendas al li, ke li skribu siajn verkaĵojn laŭ ilia merito ien sur ĝardenbarilon. — Requiescat in pace!

La Viena letero, kies tekston ni enpresis en nia lasta numero elvokis inter Viena esperantistaro grandan surprizon. Multaj esperantistoj Viena esprimis al ni sian bedaŭron, samtempe kondamnante la skribmanieron de ĝia aŭtoro. Tiel ni ricevis leterojn de Dr. E. Šos del UEA., Dir. Kaftan, A. Siebenschein, O. Zimmermann, F. W. Illing, Viena Akademio Esp. Societo, Esp. Societo »Danubio«, kaj leteron de s-o. kolonelo F. Zwach, kiun samtempe subskribis 41 ĉefaj Viena samideanoj. Goĵiga estas por ni la fakto, ke la Viena, samideanoj ne partoprenas la opinion de s-o. L. A. I kaj ke en ĝi li estas izolita. Simila tono neniam devas esti uzata de ni. Ni diskutu, ni ne nu konvinki unu la alian, sed ni ĉiam agu honeste kaj amike. Amikan senton ni ĉiam povas konservi, kvankam niaj opinioj estas ofte aliaj. Da malamikeco estas jam tro multe en la mondo, do ne estas necese ĝin ankoraŭ pli grandigi. Ni batalu por justeco sen ĉiu ajn ofendado.

El la mondo. En Brazilia ŝtato Sergipe estis laŭ la parlamenta decido enkondukita Esperanto en duagrada lernejojn kaj en la normal lernejojn de la ĉefurbo. La lernado estas nedeviga. — En Rio de Janeiro la ĉefurba konsilantaro akceptis leĝon, per kiu oni permesas nedevigan instruadon de Esp. en elementaj

metiaj kaj normalaj lernejoj. — En Bulgario komenciĝis vigla esp. laboro. En Sofia baldaŭ reaperos »Bulgara Esperantisto«. — En Italio oni preparas kongreson de Italaj esperantistoj. Aperis »Itala Esperantisto«, monata organo de Itala Esp. Federacio. — En Finnlando niaj samideanoj modele laboras per prezo eĉ per la kursoj. — En Rusio la Lerneja sekcio de popolkleriga ministerio starigis komisionon, kiu esploras diversajn sistemojn de la lingvo internacia, por enkonduki la plej konvenan en la lernejojn. — En Portugalio fondiĝis »Esperantista Socialista Asocio« (Rua do Bemfornoso 150, Lisabon). — En Germanio aperis nova esp. gazeto »La Unuigita tufthomaro« (esp. kaj germ.) eldonata de Bahai-Verlag en Hamburgo. — En Vieno estis fondita esp. eldonejo »Verlag Nova Tempo Ges. m. b. H.« kun kapitalo 30.000 K kiu per prezo kaj esp. literaturo propagandos Esp. En oktobro aperos la gazeto »Nova Tempo« sub redaktado de Dr. E Sós, Wien I., Tuchlauben 18. II.

Esperantista Centra Oficejo (Paris, 51, rue de Clichy) sciigas la samideanojn, kiuj aliĝis al la X. Univ. kongreso, ke ili anoncu al ĝi sian nunan adreson. Ĝi sendas la kongresajn dokumentojn kaj redonas la monon pagitan por loĝejoj, teatro ktp. Se iu kongresano volas oferi sian sumon al la kongresa kaso aŭ al la Franca Soc. por propagandi Esperanton, li tion ankaŭ sciigu. La Kongresa libro enhavanta 220 paĝojn estas ricevebla por Fr. 3.50.

Adresaron de Ĉeĥoslovakaj esperantistoj eldonados la Esp. Klubo en Praha. Ĝi enhavos adresojn de enlandaj samideanoj, kiuj promesis respondi almenaŭ unufoje al la el fremdlando ricevita korespondado kaj pagis 1.— K por sia enskribo. La adresaro estos sendata senpage al fremdlandaj esperantistoj, kluboj kaj gazetoj kun instruo serĉi en ĝi korespondantojn. La aliĝojn oni sendu al Dr. Stan. Kamařyt, Praha-Karlín 478.

Tra Anglio. Nia redaktoro s-o. B. Tittl estis reĝunita ĉe la soklara asento kaj baldaŭ partoprenos la kvarsemajnan soldatan ekzercon. Tial lia vojaĝo en Anglion okazos ĝis en fino de septembro.

Esperanto kaj ĉefaj gazetoj. En Socialistická Budoucnost, tagjurnalo aperanta en Brno aperis traduko de nia propono pri enkonduko de Esp. en lernejojn kiun ni enpresis en la lasta numero. La tradukinto estas prof. Kroužil. La redakcio aldonis noton, ke la demando de la lingvo internacia neestas tiel facila, ĉar krom Esp. ekzistas ankaŭ Ido kaj Esperido. — En »Poděbradské Noviny« aperis artikolo parolanta pri la propono pri enkonduko de Esp. en lernejojn, kiu estas tre malamika al Esp. Ni konstata el ĝia naŭveco, ke ĝia skribinto havas eĉ ne ideon pri la nuna stato de Esperanto, eĉ ne pri la lingvo mem. Jen parto de tiu »scienc« artikolo: »Lingvoj esperantaj estas jam du; kiu lernis unu el ili, ne komprenas la alian. — Kelkaj pruvoj pri tiu lingvo. Antaŭ kelkaj jaroj venis el Londono esperante skribita karto al la loka esperantisto. Ĉar tiu sinjoro ne komprenis ĝian enhavon li donis ĝin al mi, ĉu mi povus ĝin solvi. Tio certe fariĝis, kio estas ebula

tial, ĉar Esperanto estas miksaĵo da vortoj plej grandparte prenitaj el la lingvoj tutmondaj. Esperantisto ĝin ne solvis, ĉar ĝi estis skribita en la dua esperanta lingvo Ido.« — Ĉu vi iam legis pli grandan sensecaĵon? Kompatinda redakcio de »Poděbradské Noviny«!

DE LA ELDONANTARO.

Laŭ nia komuniko enpresita en la 1.—2. n-o, de La Progreso ni nun konsideras la nereprenitajn sumojn, kiujn ni ricevis en la pasinta jaro por obligacioj de la Eldona societo, kiel posedaĵo de La Progreso. Siajn sumojn reprenis nur f-inoj. J. Šupichová, Moudrá, Hrdinová, Plocká kaj s-o. R. Hromada, ĉiuj el Praha, La donacitajn sumojn ni akceptas tiom pli volonte, ĉar okaze de la markado de banknotoj estis al ni retenita tuta duono de nia kapitalo. Ankaŭ la financa stato de la gazeta estas en tiu ĉi jaro pli malbona ol en la lasta kvankam la nombro de abonantoj duobliĝis, ĉar presejo tute neatendite dufoje plialtigis la prezojn. Ni sciigas, ke ĉiuj personoj okupataj ĉe la gazeto laboras tute senpage. La Progreso ne estas kaj ne estos mongajna entrepreno, celante nur moralan sukceson. Ni deziras, ke nia gazeto estu anima posedaĵo de ĉiuj esperantistoj kaj por tiu celo ni petas helpon de ĉiulandaj lernejaj kaj progresemaj Esperantistoj.

Esperantista Klubo en Plzeň.

PETO.

Junularo de soc. demokrata partio en Doučevce apud Plzeň aranĝos de 20. julio ĝis 3. aŭgusto grandan ekspozicion en la loka lernejo. Le ekspozicio konsistos el naŭ fakoj, kiujn partoprenos diversaj asocioj havante tie siajn laborojn. Ankaŭ nia Laborista societo esper. havos tie propran salenon, volante tie propagandi Esperanton. La ekspozicion malfermos ministro de instruado kaj de la nacia kulturo s-o. Habrman. — La subskribinto turnas sin en la nomo de la Laborista societo esperantista al ĉiuj samideanoj kun la peto pri prunto de diversaj presaĵoj, afiŝoj, gvidlibroj, flugfolioj, poŝtkartoj ktp., kiujn li poste sendifekte resendos. — Antaŭan dankon por atabla helpo! — J. Pech, prezid. de Labor. soc. esp., Plzeň, Houšková 4.

KVITANCO.

Sub la devizo »Al helpo« nia administracio ricevis jenajn sumojn: Jul. Boschan, K 10, Rondeto de Esperantistinoj K 30, f-ino. S. Žáčková K 5 (ĉiuj el Praha), B. Tittl K 20, ing. Novák K 10, M. Starý K 10, F. Kavan K 17, A. Loukota K 6, F. Klein K 6, F. Zikan K 4, E. Kubásek K 4, J. Brožík K 4, I. Gross K 4, nepomita K 10, (ĉiuj el Plzeň), Dr. J. Fousek, Přelouč K 10, J. Socha, Radim K 20, Entute K 170. La sumo estis sendita al sia celo (vidu la lastan numeron de L. P.) kaj ni esprimas koran dankon al la donacintoj.



Waldes Antob

Cigared-papero Cigared-tubetoj

WALDES & KO.

Praha-Vršovice (Bohemio)

Informace ciziny Esperantem,

propagační leták, vydaný admin. „La Progreso“.
je výbornou pomůckou všem širitelům Esperanta.
1 kus 30 haléřů, 10 kusů 2:50 K., 100 kusů 20 K.
Objednávejte u „La Progreso“, Plzeň.

Bildon de la nacia vivo en Bulgario
prezentas la libro de Ivan H. Krestanov:

La Bulgara lando kaj popolo

(128 paĝoj 14×21 cm kun etnografia karto).
Prezo K 6.— afrankite. Ricevebla ĉe la
redakcio de La Progreso.

Ĉeĥoslovaka Esperanto-oficejo

(Ĉeĥoslovanská esperantská kancelář)

Praha III., Nerudova ulice 40, III. p.
(fondita de s-o. Aug. Pitlík)

aranĝas Esperanto-propagandon, informas
fremdlandon pri kultura kaj politika celado
de la Ĉeĥoslovaka nacio kaj prizorgas infor-
mojn pri eksporto kaj importado de ĉiuj komer-
caĵoj.

La sola en la lando de Zamenhof
aperanta gazeto estas

»Esperantista Voĉo«

Monata gazeto internacia

Organo de Krakova Esp. Societo kaj de Varsovia
Klubo Esp-ista, en kiu kunlaboradas i. a. Prof. Univ.
O. Bujwid. Prof. Univ. Baudouin de Courtenay, Br.
Kuhl. Nicofero Verdkapulo. Dro Leono Zamenhof
k. a.

La jara abonprezo 10 K (6 M)

Adreso: „ESPERANTISTA VOĈO,“ Krakovo
(Polio), Dietla 62 II.

Jus aperis:

Pres. prof. T. G. Masaryka:

První poselství k národu československému.

La broŝuro (bohemteksta) en bela mankolorita
bindaĵo, kun portreto de Masaryk, bibliofile
aranĝita, kosta 8.— K. Al societoj rabato.

Mendu ĉe esperanta firmo:

J. B. VLACH, Praha-II., Ferdinandova 38

Ankaŭ en ĉiuj librovendejoj ricevebla!



Kohi-noon
 BOUTONS PRESSION
Pressoir Waldès Breveté S.G.D.G.
 Marque Mondiale



Prembutonoj
 Metalbutonoj
 Kudrilaĵoj



WALDES & KO.



Praha-Vršovice (Bohemio)

Legu la interesan verketon de J. S. Machar:

BENEDEK

Esperanta traduko de profesoro R. Fridrich.
 Eldonita de **J. KARÁSEK**, librovendejo
 en Prostějov-Moravio. — Prezo 70 hel.

Fremdlandaj esperantistoj abonu

LA PROGRESON

ĉe so. **Svitberto J. Degenkamp**, del. de
 U. E. A.
 Utrecht, Betlehemweg 36, Nederlando.

Se vi deziras havi bonegan internacian gazeton,
 abonu:

» ESPERANTO «

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO.
 MONATA GAZETO REDAKTATA TUTE EN ESPERANTO.

16—20 paĝoj de plej bona teksto.

En havo: Artikoloj de ĝenerala intereso pri internaciaj problemoj, soci-
 alaj demandoj, geografio, ekonomio, scienco. — Literaturoj. — Esperan-
 tismo. — Kroniko. — Tra la gazetaro. — Tra la libraro. — Lingvaj studoj.
 — Anoncetoj.

Jara abono: 12 kronoj, Luksa eldono: 14 kronoj, pageblaj al administri-
 de „La Progreso“ en Plzeň, aŭ Sro. **Dro. Sós**, Tuchlauben 18., Wien.

Senpaga **specimeno** laŭ peto de la administrejo:
Museumstrasse 14. Bern. (Svisio).

Via horloĝo iros precize

se vi ĝin donos por
rebonigi al



Fr. Novák,
horloĝisto en Praha I.
Malé nám. 10.

Magazeno de horloĝoj
kaj juveloj. - Vendejo
de esper. signoj de
Esper. klubo en Praha.

NACIOTIPAJN

memorlibrojn, albumojn, notlibrojn, murkalen-
darojn, kadretojn, ĉiuspecajn skatoletojn

en artoplena, mankolorita aranĝo

liveras esperanta firmo

J. B. Vlach, Praha-II.

Ferdinandova 38.

Postulu prezaron!

Postulu prezaron!

T. & A. BAŤA

ŝuofabrika kaj ledotanejo
ZLÍN-PARDUBICE.

Propraj vendejoj:

Praha, Václavské náměstí 32

Brno, Koblížná ulice 24.

Opava (Troppau), Hrnčířská 14

Wien (Viedeň), Taborstrasse 17 a

Kraków, Szewska 22

Czernówitz, Rathausstrasse 4

Lwów, Akademicka 5

Lódz, Piotrkowska 74

Bratislava (Presburg), Michalovská 5

Przemyśl, Franciskanska 25.

Zlín, náměstí 60.

Mor. Ostrava, nám. 14.

Znojmo, Koyářská 7.

Kroměříž, Komenského

nám. 107.

Přerov, Ferdinand. 15

Šumperk, nám. 27/28

Hodonín, Masarykovo

18

Olomouc, Kinopasáž

Val. Meziříčí, náměstí

Břeclava, Frant. Jos. 17

Nový Jičín, obch. dům

Jedek

Hranice, náměstí

Vyškov, Pánská 10

Svitava, Brněnská 4

Jihlava, Schillerova 5

Uherský Brod, náměstí

163

Kyjov, Komensk. tř. 4

Místek, náměstí 13

Vsetín, Dolní nám. 304

Kojetín, Masarykovo

náměstí

Krňov, Fr. Jos. nám. 12

Frydek, náměstí

Trenčín, nám., budova

gymn. Pisr.

Malacka, Slovensko

Trnava, Hosp. banka

Žilina (Zsolna), Sze-

chenji 209

Nitra, Slovensko

Růžemberok, Slovensko

Užhorod (Kežmark)

Lučenec (Luczivna) -

Nové Zámky

Baňská Bystřice

(Besztercebanya)

Košice (Kassa)

Liberec, (Reichenberg),

Schückerstrasse 34

Pardubice, budova

sporiťelny

Kolín, náměstí 72

Ústí n./L., (Aussig a./E.)

náměstí 28

Hradec Králové, Palác

Zál. a úvěr. ústavu

Ml. Boleslav, Pražská

ul. 116/1

Jaroměř, Husova tř. 91

Jičín, Velké nám. 60

Čáslav, Palackého 63

Dvůr Králové, nám. 57

Německý Brod, Komen-

ského 153

Turnov, Palackého 145

Plzeň, Žbrojnická 3

Čes. Budějovice, Šter-

nekova 18

Kladno, Královská 38.

Jindř. Hradec, Palac-

kého 94

Příbram, náměstí 142

Tábor, Třída Čes.-sl.

legií 640

Písek, Riegrovo n. 26

Louny, Žižkova 305

Náchod, Pražská 63

Klatovy, nám. 170/l.

Karlovy Vary (Karls-

bad), Fr. Jos. tř. 607

Most (Brüx), nám. 82

Amstetten, Viehdor-

ferstrasse 4

Wner. Neustadt (Vid.

Nové Město), Kaiser

Wilhelmstr. 64

Esperantia entrepreno. — Oni parolas kaj korespondas esperante.

Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: B. Tittl, Plzeň, Radyňská ul.
Presis: Laborista presejo, Plzeň.